Ha! Kia eltrovo! Jen tute tauga pudelo, kvankam blanka! Fajfante al la saltanta hundeto kaj, karesante lin, mi donis al li peceton da sukero. Mi movetas la voston por esprimi, pudelmaniere,

sian dankon. Mia koro eksaltis pro espero, ke li eble respondos je la nomo anoncita. Ho, Karlo! Ho, eta Karlo! Suprenlevante kaj karesante lin, mi forportis la karan hundeton en la cirumejon por nigrigi lin. Promesinte al la cirumisto la duonon de la rekompenco ricevota, post longedaura interparolado li signendonis la jeson kaj komencis cirumi la karan blankan pudelon. Komence, la hundeto tute ne amas la nekutiman procedon sed, doninte al li kelke da pecetoj da sukero, mi povis facile firmiteni la karan beston, dum ke la cirumisto tutamplekse nigrigis lin. Kiam la cirumado estis plenumita, ni ambau rigardis la belan nigrigitan pudelon. Se la esperopena beleco de la antaue blanka pudelo enigis la koron, la plenespera beleco de la nigra pudelo tute levigas mian junan koron.

Eksaltis la koro je espero, kiam mi amokule rigardis la karan hundeton. "Kie ajn estas la volo, tie ajn ankau oni trovas la vojon"; kaj "Dio ja protekte helpas tiujn, kiuj ne nur volas, sed plenumas." Komence, mi iomete ektimis sed, kunprenante la tutan mian forton kaj volon, facilanime kaj sukceserte mi estas ekscitita de la espero gajni la malavaran rekompencon. Tion pensante, mi iris laulonge de la Verdstela Avenuo, sekvate de la senmakula pudelo kiun mi firmitenis per la forta fadeno. Ne durante unu vorton, kaj tute forgesante la fajfadon, mi nur de tempo al tempo flankenrigardis mian kvarpiedulon por certigi al mi ke li eble ne jam perdis la nigran koloron. Kvankam konate kiel petolulo nemetiista, mi neniam antaue penadis trompi malbonmaniere la samtempularon. Do, fojé kaj ree venis al mi plimalpli la sento de eventuala malsukceso. Kun multpeza koro mi iris antaue. Trapasante iom distance la dekvaran straton, mi post nelonge alvenis je la domo de Sinjorino Stelverdo, la posedintino de la perdita pudelo. Unu minuton plimalfrue mi trovis min antau la pordo de la eleganta domo, numero 1412 Esperanto Strato, pitoreske lokita proksime de la mezo de belvida domvico. Staris automobilo antau la domo. Korpremanta silento pezis kvazau tuno sur

pa tuta situacio. Supreniri au ne supreniri, tio estas la demando. Neniun homon mi ekvidis. Mi iomete frostremis, mi ja estas tutsola. "Fortulo sola estas ja la plej potenca," tamen mi supreniros!

Ekpremanate la elektran butonon, mi atendis kun mia kvarpiedulo. Post nelonge oni malfermis la pordon kaj senmakule vestita negrino demandis pri mia misio. Ekvidante la nigran pudelon, oni petas min eniri kaj atendi kelke da tempo en la salono, Sinjorino Stelverdo, oni sciigis min, eniros tre baldau. Parolintion, la negrino forlasis la salonon. Ree mi estis tutsola! La nigra pudelo sidis apud mia tabureto. Ha! Kia beleco! Kurigante miajn rigardojn de la unu al la alia flanko de la lukse meblita salono, mi sentis min kiel neniulo. Estis certe ke la posedantino de la salono ne bezonas perlabori sian vivtenon; tute forgesante, unumomente, mian gravan mision, mi kurigis la rigardojn de flanko al flanko, de la pargedo al la plafono. Kia beleco! Surmure estis pendigitaj la majstroverkoj de la pentrista arto; je la dekstra flanko estis la vivsimila portreto de nia iama kaj fama prezidanto Abraham Lincoln, kiu havis la subskribon "Liberiginto de la usona negraro el sklaveco"; je la alia flanko estis la famkonata portreto de Doktoro Zamenhof, enhavanta la subskribon "Liberiginto de la tutmonda homaro el diverslingveco." Mi sentis min kvazau hejme, proksime de la simboloj de paco kaj progreso. Kurigante miajn rigardojn al la plafono, mi ekvidis kandalabron pendigita de la volbita plafono, ornamita per multe da elektraj fokuso kiu sendube plibeligas la tutan aspekton per diverskoloraj lumradioj. Neniame antaue mi ja ekvidis similan aspekton! Neprovinto ja ne povas imagi, kiel bela estas la sento helpi al sia proksimulo! Tia bonsento estas, unuvorte, senegala! Tiamaniere meditante, mi ree trovis meze de la neenvinda situacio. Jen! Ekbatas la sonorilo de la apuda predikeja turo trifoje. Jam la tria pretere! Kaj mi forlasis la gepatran domon frumatene! Verdire, mi sentis iom da malsato!

Auskultu! De malproksime mi audis belajn vortojn, adiaue dirante al iu kara

vizitulino; nelonge post tio oni audis susuradon de silko sur la pargedo en la apuda salono. Post kelke da sekundoj ree eksonis susurado de silka vesto rapide movante sur la pargedo. Enirinte la salonon, altkreska sinjorino gracie min salutis kaj mi tuje riverencis. Mi estis preskau blindigita, vidante la belegan robon de blanksilka materialo! Kia beleco, kiam la sinjorino sidis sur palisandra kanapeto tegita per multekosta damasko! La hararo, certe estas majstr-verko de la friza arto! Ekvidante la nigran pudelon apud mia tabureto, la sinjorino eklevis la manojn kaj ekparolis: "Dank' al Dio, ke la kara pudelo estas retrovita!" Larmoj ja elfluis el la okuloj. "Ho! Karlo! Mia kara Karlo! Karula mia, venu al mi, Karuleto mia!" Eble ankau blindigita de la beleco nekutima, la hundeto aliris al la sinjorino, kiu suprenlevis la hundeton retrovitan por karesi kaj karesadi lin. "Karuleto mia, kial vi do foriris de via hejmo? De via bonkora mastrino? Eble vi ne povas klarigi tion, eh? Mi ja pasigis sendorme la noktojn pasintajn, vi ja tute ne reiris hejmen, Karlo mia! Mi ofte ploretis pri vi, karega forestulo!"

Ekaudinte tion, mi devis fari superregan klopodon por resti tutserioze. Iom post iom aperis plimulte da makuloj sur la bela robo de la sinjorino. Mi devis foriri. Mi ne povas kontentigeble sciigi kio okazis post tio, mia memoro tute ne estas fidela kaj malebligas pluan priskribon de okazintaj detaloj. Timigite, mi deturnis miajn rigardojn kaj per rapideco neniam antaue konata, mi forlasis la salonon kaj domon multe pli rapide ol mi estis alveninta. Kial? La ektimo forpelis min, mi neniam rigardis posten, mi nur povas konstati, ke mi trovis min sur la strato, sen hundo, sen rekompenco, senigita de espero. Sed la sperto gajnita estos neforgesebla al mi, en mia tuta vivo tio estos klara en miaj pensoj: "Unufoje kaj neniam ree!"

### PRI VIRINOJ.

"Iuj virinoj, edziniĝante, postulas ĉion kaj donas ĉion: kun bonaj viroj ili estas feliĉaj; kun malbonaj viroj ili estas la

malĝojulinoj. Iuj postulas ĉion kaj donas malmulte: kun malfortaj viroj ili estas tiraninoj; kun fortaj viroj ili estas la eksedzinoj. Iuj postulas malmulte kaj donas ĉion: kun simpatiaj animoj ili jam estas en la ĉielo; kun nesimpatiaj ili baldaŭ estas en siaj tomboj. Iuj donas malmulte kaj postulas malmulte: ili estas la senkoraj, kaj ili alportas nek la ĝojecan de la vivado, nek la pacon de la morto."—Tradukis *H. Hall*.

### DEK REGULOJ OBSERVINDAJ.

Laŭ Thomas Jefferson esperantigis *W. Schmeil*  
por *Germana Esperanto-Gazeto*

Prokrastu neniam ĝis morgaŭ tion, kion vi povas hodiaŭ prizorgi.

Neniam ĝenu alian personon pro afero prizorgebla de vi mem.

Disponu neniam pri via mono, antaŭ ol vi tenas ĝin en viaj manoj.

Aĉetu nenion pro ĝia malalta prezo, ĝi tamen estas tro multekosta por vi.

La fiero kostas al vi pli multe ol la malsato, la soifo kaj la malvarmo.

Oni neniam pentas esti manĝinta tro malmulte.

Tio, kion ni prizorgas volonte, kaŭzas nenian penadon al ni.

Kiom da ĉagreno kaŭzas al ni malfeliĉaĵojn neniam okazintaj.

Rigardu ĉiujn okazojn de la pli bela flanko.

Estante kolera, nombru ĝis dek, sed ĝis cent se vi estas kolerega.

### THE CORRELATIVES.

Prof. G. Macloskie, of Princeton University, has written the following mnemonic lines for the benefit of Esperanto beginners. Those who have trouble in fixing the meaning of these little words will find these lines a help for a while at least:

The roots *i*, *ki*, *ĉi* *ti*, and *neni*, may recall  
*Any, what, and all, that also nothing at all.*  
Add the endings to these to make words:

*a, o, u,*

Are for *adjectives, objects, and persons, as who;*

*Am, e, el* are for *time, place and manner;*

*Al* for *cause; om* for *muchness; and es, for an owner.*

## FUNEBRA PAROLADO

*R. G. Ingersoll. El angla originala tradukis  
Horace M. Stevens.*

“Mi scias ke estas vante orumi malĝojon per vortoj, tamen mi deziras forpreni de ĉiu tombo ĝian timon. Tie ĉi en la mondo kie vivo kaj morto estas egalaj reĝoj, ĉiuj devas brave renkonti tion, kion ĉiuj estas renkontintaj. La estonto estas plenigita per timo, maku-lita kaj malpurigita de la senkora pasinto. De la mira arbo de vivo, la burĝonoj kaj floroj falas kun la matura frukto, kaj en la komuna lito de tero, patriarkoj kaj infanetoj dormas flankon ĉe flanko. Kial ni devus timi tion, kio venos al ĉiuj kiuj ekzistas? Ni ne povas diri. Ni ne scias kiu estas pligranda beno, vivo aŭ morto. Ni ne povas diri ke morto ne estas bona. Ni ne scias ĉu la tombo estas la fino de tiu ĉi vivo, aŭ la pordo de alia, aŭ ĉu la nokto tie ĉi ne estas ie tagiĝo. Nek povas ni diri kiu estas pli favorata, la infaneto mortanta en la brakoj de sia patrino antaŭ ol ĝiaj lipoj lernis paroli vorton, aŭ tiu, kiu vojaĝas la tutan longon de la malglata vojo de vivo, farante dolore la lastajn malrapidajn paŝojn per apogilo kaj lambastono. Ĉiu lulilo demandas de ni “el kie?” kaj ĉiu ĉerko, “al kie?” La senklara sovaĝulo ploranta super sia mortinto povas respondi al la demando tiel inteligente kaj kontente kiel la robita oferisto de la plej aŭtentika kredo. La larmplena senklereco de la unu estas ĝuste tiel konsola kiel la kleraj nesencaj vortoj de la alia.

“Neniu, staranta kie la horizonto de vivo tuŝas tombon havas ian rajton profeti pri estonteco plenigita per doloro kaj larmoj. Eble morto donas ĉion, kio estas valora en vivo. Se tiuj, kiuj enbrakigas nin, koron ĉe koro, neniam povus morti, estas eble ke amo forlasus la terglobon. Estas eble ke komuna kredo forigos el niaj vojetoj la malbonajn kreskaĵojn de memamo, kaj mi preferus vivi kaj ami kie morto estas reĝo ol havi eternan vivon kie amo ne estas. Alia vivo estas nenio, se ni ne konas kaj amas denove tiujn, kiuj amas nin tie ĉi. Ili kiuj staras ĉirkaŭ tiu ĉi tombo kun

rompantaj koroj havas nenion por timi. La pligranda kaj plinobela kredo pri ĉio kio estas kaj estos diras al ni ke morto ne povas esti io pli malbona ol perfekta ripozo. Ni scias ke pro la komunaj deziroj de vivo la bezonoj kaj devoj de ĉiu horo, ilia malĝojo malpliigos tagon post tago ĝis fine tiu ĉi tombo estos por ili loko de ripozo kaj paco, preskaŭ de ĝojo. Por ili estas tiu ĉi konsolo; la mortintaj ne suferas. Se ili vivas denove, ilia vivo certe estos tiel bona kiel nia. Ni havas nenan timon; ni estas ĉiuj infanoj de la sama patrino, kaj la sama sorto atendas nin ĉiujn. Ni ankaŭ havas nian religion, kaj ĝi estas—helpo por la vivantoj, espero por la mortintoj.”

## LA TERURA EKKRIO

Antaŭ tre, tre longe, en tempo nun preskaŭ tute forgesita, ekzistis en la Eskotila Markolo la mirinda insulo Toruno. Certe neestanta nun, eble la insulo eĉ neniam ekzistis, sed,—nezorgu! En la tempo pri kiu mi priskribas vivis la fama, saĝa Reĝo Garal, kiu estis tiel saĝa kaj instruita ke li ĉiamaniere donis al la kulturo de sia periodo la fortecon de sia influo kaj riĉeco. Precipe, la astronomio allogis lian atenton kaj ofte lia trezorejo estis iomete malpligrandigita per ia elspezo por teleskopoj aŭ observatorioj. Dum lia tuta rego, la historiistoj rakontas al ni, la insulanoj konatiĝis, pli ol iam ajn antaŭe, pri la mirindaĵoj de la ĉielo kaj la movadoj de la steloj. Tial, la popolo de Toruno ne estis tre surprizitaj kiam la Ĉefastronomo de la Reĝa Kolegio anoncis ke li ĵus eltrovis ke vere ekzistas homoj sur la luno! Grava kaj ĝoja eltrovo! Nun la Reĝo de Toruno povas fari entreprenon pri kiu li ofte kaj fervore revis. Nun li povas interkomuniki kun la loĝantoj de la luno, kaj por efektiviĝi la planon li elsendis al ĉiu parto de sia reglando heroldojn, kiuj pompe anoncis ke, post unu semajno, je la oka vespere, la tutinsulanaro devos kolektiĝi sur la Heruga plataĵo. Tie, je la signalo de la Ĉefministro, ili devos voĉfari tian ekbrulon ke la lunloĝantoj certe aŭdos. Oni ĉie kore aprobis la ideon, kaj laŭ la ordono

de la reĝo, liaj regnanoj je la tago reĝe elektita kunstaris ĉe la kunvenejo. Ĉiu persono alportis kun si sian plej bonan voĉon plifortigitan per tagoj de praktiko kaj atento al la reguloj de higieno. Fine, je la preciza momento, dum la tuta ĉeestantaro nerve atendis la signalon, la Ĉefministro flirtis sian bastoneton. Nu, kio okazis? Kia terura ekkrio! Kia orelfendanta bruego! Ne, mi eraris; mi devas raporti al vi la absolutan, bedaŭrindan veron. Ne eĉ unu murmureton oni aŭdis; ĉiu homo, la lastan momenton, tro sciemiĝis por ke li aŭskultu la treegan lunatingontan bruegon kiun la aliaj nepre faros.—Verkis *Henry W. Hetzel*, Moylan, Penna.

### AFORISMOJ PRI EDUKADO.

*Barnato, en Germana Esperanto-Gazeto*

Ne agrable, esti sola en la mondo. Malagrabable, esti sola en societo, en profesio. Plej malagrabable, esti soleca en familio kaj edzeco.

La plej tragedia el ĉiuj fariĝoj: ke homo de plej varma koro, idealisto de plej potenca volo ofte iĝas tiel soleca, tiom izolata, ke li ne plu havas amikojn. Neniun, kiu al li konfidus sian personon, kiu al li prezentas la sunan flankon de homa estaĵo. Vi konstruas hejmon estontan? Ni fermas la estantan antaŭ vi! Nun li malkutimiĝas ŝati siajn familianojn, siajn kolegojn, sian patrujon, sian epokon. Se poste, malesperante, li forĵetas la ŝarĝon de siaj idealaj klopodoj, tiam li estas multe pli malriĉa ol iu simpla bonvivulo aŭ ĝuemulo, kiu almenaŭ ŝatas kelkajn homojn en la mondo! Sed li mem, li ne plu havas simpatian kaj inklinon al nur unu estaĵo sur la tero; maloferema, sendanka kaj preskaŭ senkompata li rigardas ĉirkaŭen. Anĝelo falinta fariĝas diablo . . . kaj tamen, sinjoroj!

Kaj tamen? Sed denove mi dubas. Ĉu estonte ni eble havos religion, kiu ne instigas kaj ekscitas nin al neatingeblaj celoj? Kiu eble regulante adaptiĝos al la evolucio de la karaktero morala? Kiu eble nur postulos: ne estu malpli morala, nur estu iomete pli morala ol la lastaj el viaj antaŭvenintoj? Etikistan sistemon,

kiu indulgos la neeviteblan malrapidecon de ĉia anima progreso?

Dum aliaj epokoj oni trovis, ke prefere tiu estis admirata kaj obeata, kiu postulis neeblojn. Sed hodiaŭ?

Kaj ni mem? Ĉu ĉiam denove ni volas ordoni al nia junularo: Estu senegoistaj! Sciante, ke sen egoismo nenio vivanta povas ekzisti? Estu senkulpaj! Sciante, ke sole nia ekzistado nepre kondiĉas kaj naskas kulpon? Estu senpasiaj! Sciante, ke sen pasioj nia animo ne povas kreski kaj disvolviĝi?

Ĉu ĉiam denove ni volas postuli: Estu nulo por ke la tero povu nutri pli multajn el via speco; pli kaj ĉiam pli grandan nombron da nuloj?

Kaj tamen! Batalante kontraŭ seka moraleco, ni tamen solene konstatas, ke vera amo kaj kompreno de homo al homo estas la nutraĵo de nia animo, la fonto de etika vivo, la ĉefa motivo de homara beleco.

Sed sklava, adresita moraleco, kiu ne baziĝas sur propra anima sperto, sur vera individua amo al ia homo, tia certe nur estas farso kaj venenas la sangon de freŝaj popoloj.

Certe mi scias, ke du trionoj de ĉiu moralo nur rilatas mekanismon de reciproka helpado; demandon pri intelekta edukado, ne pri la sorto de nia animo.

Vi volas eduki vian idaron? Ili nek estos feliĉaj nek dankemaj sole pro sia ekzistado. Zorgu, ke ili ŝatu vin mem, kaj ili ankaŭ malfermos sian koron kaj okulon al la mondo! Nur tio al ili povas garantii profundan prosperon, kaj al ilia interna organismo floradon, forton kaj elastecon!

### LA ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LA KOMERCAJ LERNEJOJ.

Tre estimataj samideanoj:

*La internacia societo por la disvolvigo de l'komerca instruado*, kiu ĉiujare aranĝas internaciajn kursojn kaj eldonas multe legatan revuon, tiu societo enskribis en la ĵus aperinta numero de sia revuo jenan alvokon ankaŭ en esperanto:

“La membroj de la internacia societo por la disvolvigo de l'komerca instruado,



# POSTAL PROPAGANDA

**C**OULD there be a more fascinating labor than that of bringing the peoples of the world into more intimate understanding by means of an international language?

Could there be a more worthy enterprise?

Wouldn't you like to help it in every way you can?

Part of this work we can do only as individuals—by personal work among our friends and the people of our communities.

Let us all do that—speak a good word for Esperanto whenever possible. There are thousands who have not yet learned the language who lose no opportunity to say: "Esperanto is a good thing and I want to see it taught in every school."

## WHOLESALE PUBLICITY

There is another phase of the work—that of systematic, wholesale publicity. This cannot be done efficiently on a small scale, any more than shoes can be manufactured cheaply without machines. The Postal Department of the United States is an immense machine which can be made to do wonderful work for the Esperanto propaganda.

But it takes great amounts of money to work this machine, just as it takes great power to propel a steamship. For example, to send one circular about Esperanto to every teacher, editor, doctor and minister in the United States would cost thousands of dollars.

The Postal Propaganda is just as important as the personal work, and can be successfully done only by a highly-organized center, like a publishing house. By a sort of common consent and a process of elimination, the greater part of the postal propaganda in the United States has been left to be done by Arthur Baker, editor of the Esperanto magazine in Chicago.

Mr. Baker knows how to write advertising that convinces a fair proportion of readers. He knows how to manufacture it by the latest and best machinery known to printers. He knows how to secure half a million live addresses of educated people. What he doesn't know is how to buy postage stamps in thousand-dollar lots without a stiff bank balance.

That is the why of this advertisement. This postal propaganda is woefully, miserably neglected. Naturally. Any sane person would rather dance on the deck of the steamship than shovel coal into the furnaces. But if nobody shoveled the coal the ship would never get to port.

We are willing to shovel the postage stamps into this Esperanto propaganda. We want several hundred people, with absolutely no personal sacrifice, to furnish the money to buy the stamps. Read the fourth page of this advertisement.

INCORPORATED UNDER THE LA



# American Espo



Capital S  
Common Stock, \$25.000

THIS CERTIFIES THAT *Will*  
*Twenty*

American Esperantist Company, fully paid and non-as  
ation, in accordance wi  
this Certificate.



The holder of "Preferred Stock"  
dividend of seven (7) per centum per ann

Should the net profits in any on  
portion thereof shall be cumulative, an  
before any dividends are declared or pai

The Preferred Stock shall not be a  
preference as to assets in the event of li

In Witness Where  
signed by its President

at Chicago, Illinois, thi

*L. M. 7*



OF THE STATE OF SOUTH DAKOTA.



#20# SHARES

# Merchantist Company

Stock \$50,000

Preferred Stock, \$25,000



*Sam Smith* is the owner of

shares of Ten Dollars each of the Preferred Stock of the  
Messable, transferable only on the books of the Corpora-  
tion the By-laws, by endorsement hereon and surrender of

is entitled to receive and the Company is bounden to pay from the net profits, a fixed yearly  
sum, before any dividends are set apart or paid upon the Common Stock.

If any year not be sufficient to pay said preferred dividend, either in whole or in part, any unpaid  
dividend shall attach to and become a charge against the net profits of each succeeding year until paid,  
and shall be paid upon the Common Stock.

The holder of this certificate is entitled to a further dividend in any year, and shall be non-voting, but shall entitle the holder to  
participate in the liquidation of the Corporation.

In witness whereof, the said Corporation has caused this Certificate to be  
signed by its President and Secretary, and its corporate seal to be thereto affixed

*2nd* day of *February* 19*10*

*Fisher*  
Secretary.

*Arthur Baker*  
President.

0.00

# Ten-Dollar Shares Paying 7%

**T**HE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY was organized for the purpose of promoting the propaganda of Esperanto in the United States. We publish a magazine, and publish, import, buy and sell Esperanto books of every kind. The present manager, Arthur Baker, founded the firm in 1906. We do an exclusively mail business, and have probably put into the mails twenty times as much Esperanto propaganda matter as any other firm in America. For this reason we are justly entitled to call ourselves, in this country, headquarters of the

## POSTAL PROPAGANDA

For the purpose of permitting those who approve the character of our work to assist in it without financial risk we issue shares of \$10.00 each, paying annual dividends of seven per cent. These shares are fully paid, non-assessable, and have no stock-holders' liability such as attaches to holdings of national bank stock. Their safety as an investment is assured by the four years' record of the American Esperantist Company, in which we have successfully encountered the tremendous difficulties which oppose a propaganda enterprise of this kind.

A stock certificate is a contract between the Company and the holder. Read the form on previous page.

Do you approve the Esperanto propaganda?

Will you let us pay you a fair return for the use of your money in promoting it in the United States? Subscribe for as many shares as you desire, and pay for them now, or installments of one dollar per month for each share.

America Esperantist Company,  
700 East Fortieth Street, Chicago.

I hereby subscribe for ..... Shares of the Preferred (7 per cent) Stock of the American Esperantist Company, and agree to pay this subscription at the rate of ..... dollars per month. Total amount to be paid, \$.....

Name .....

Address .....

amikoj kaj kontraŭuloj de Esperanto, estas petataj, informi nin, ĉu ili deziras aŭ malaprobas, ke la 'Internacia revuo por lo komerca instruado,' regule publikigu en Esperanto resumojn de ĉiuj laboroj, aperintaj en la revuo."

La sama societo aranĝos kursojn en Vieno proksiman jaron kaj samtempe okazos grava kongreso de komercaj profesoroj kaj studentoj de komercaj universitatoj. Tiu kongreso enmetos en sian labor-programon temon: "Enkondukado de Esperanto en la komercaj lernejoj."

Ĉar la prezidanto de tiu granda internacia societo Sro. A. Junod en Bern estas nun tre fervora al nia afero, kaj ĉar jam dum la lasta kurso en Havre sinjoro Karlo Bourlet faris du paroladojn kaj gajnis multe da adeptoj, ni povas esperi ke la kongreso en Vieno tre serioze diskutos pri la afero.

Samideanoj: Sendube niaj kontraŭuloj estos viglaj kaj respondos al la demando de la direktanta komitato kontraŭ la enkonduko de Esperanto en la revuo. Pro tio ankaŭ ni ne devas dormi sed montri al ili, ke Esperanto vivas kaj enhavas forton.

Ciu esperantista fabrikanto, komercisto, negocisto kaj komercoficisto devas rigardi kiel honora devo tuj aliĝi al Internacia Asocio por la disvolvigo de l'komerca instruado kaj *voĉdoni por Esperanto*. La kotizaĵo ja nur estas 1.25 Sm. pojare. Aliĝilojn oni adresu al sinjoro A. Junod, departemento federala de komerco en Bern, Svisujo. Mi petas ankaŭ informi nin pri la aliĝo. Se el tuta mondo membroj aliĝus al citata asocio tiu agado ne povus resti sen sukceso, kaj certigus al Esperanto la venkontiel, ke ĝi baldaŭ eniĝus en ĉiujn komercajn lernejojn de l'tuta mondo. Se la komercaj lernejoj estos gajnitaj, baldaŭ sekvos la aliaj.

Pro tio, samideanoj de l'tuta mondo se vi ne atentus ĉi-tiun okazon vi ne plendu, se la komercistaro daŭrigos rigardi Esperanton kiel aferon de mallonga vivado. Refutu ĉi-tiun opinion, aliĝante kiel eble plej baldaŭ al la citata asocio kaj voĉdonante por Esperanto. —*Dro. M. Kandt.*

Estro de la fako "Komerco kaj Industrio" de U. E. A.

## LA OKCIDENTO PROVOS ESPERANTON

En la urbo Portland, ŝtato Oregon, Usono, kiu enhavas 250,000 loĝantojn, estas granda komerca organizaĵo, kun kiu okdek kluboj komercaj estas unuiĝintaj por reklami la ŝtaton kaj ĝiajn vivrimedojn. Oregon havas nur unu grandan urbon, kaj tiu staras sen konkuranto apud la granda Kolumbia Rivero. Ĉi tiu estas la sola rivero, kiu trairas la du grandajn montarojn en la ŝtato. La urbo Portland kuŝas ĉe la kunfluo de la riveroj Willamette kaj Kolumbio, kaj ĉi tiu cirkonstanco faras el Portland, kun ĝiaj multaj fervojoj, la akvonivelan lokon kolektadan kaj dissendadan por teritorio de ĉirkaŭ 350,000 mejloj kvadrataj, al kiu povas naĝi la plej grandaj ŝipoj sur la oceano.

Ĉi tiuj komercaj kluboj en Oregon estas ĉiam serĉantaj bonajn metodojn por reklamado. Antaŭ nelonge klubo en unu el la urbetoj havis malgrandan anoncon en AMERIKA ESPERANTISTO, kaj kun granda surprizo ricevis kvinoble da respondoj kaj demandoj ol de iu alia anonco. Sekve la granda klubo en Portlando deziras scii la disvastigon de la nova lingvo, kaj ĝi volas ke la Esperantistaro montru tion al ĝi. La klubo publikigas multege da literaturo reklama. Se la Esperantistoj povas pruvi ke la nova lingvo jam estas ĝenerale uzata, la klubo publikigos informaĵon, libretojn ilustritajn, k. t. p., en Esperanto, kaj reklamos per gazetoj Esperantaj.

Tial ni petas Esperantistojn ĉie ke ili skribu tuj, petante ĉian informon pri la lando de Oregon.

Demandu pri la apudmara lando kie kreskas la plej grandaj arbaroj en la mondo. Tie ankaŭ estas karbejoj, lak-tejoj, kaj fiŝkaptejoj.

Demandu pri la mirinde fruktodonaj valoj de la riveroj Willamette, Umpqua, kaj Rogue. Ĉi tiuj estas okcidentaj de la grandaj Kaskadaj Montoj, kaj ilia klimato estas milda. En la valoj oni kreskigas la plej bonajn pomojn, persikojn, legomojn, prunojn, juglandojn, kortbirdojn, kaj brutarojn bonspcajn. Estas bonaj lernejoj, preĝejoj, kaj hejmoj tie, kaj sufiĉe da spaco por ankoraŭ

pli multe da homoj.

Demandu pri orienta Oregono, kie oni nun konstruas multajn novajn fervojojn tra la tritika kamparo, farante uzablaj la grandajn superakvumitajn landojn, kie ekfondiĝas novaj urboj kaj urbetoj.

Oregon volas ke la tuta mondo konatiĝu kun ĝiaj utilaĵoj. Se la rezultatoj pruviĝos ĉi tiun, ni uzos la internacian lingvon por pliaj reklamoj. Al la amikoj de Esperanto ni donas ĉi tiun okazon por montri la utilecon de la lingvo kiel rimedo por reklamado.—Skribu tuj al *Sro. Tom Richardson, Administranto, Portland, Oregon, Usono.*

## GRANDULO KAJ MALGRANDULO

El "Vicar of Wakefield" tradukis *Ella Rees.*

Fojon vivis grandulo kaj malgrandulo kiuj estis sindonemaj amikoj. Ili interkonsentis, ke ili neniam forlasos unu la alian, sed iros serĉi aventurojn. La unua batalo estis kontraŭ la sarakenoj. La malgrandulo estis kuraĝa kaj donis al unu kontraŭulo koleregan baton. La sarakeno ricevis nur vundeteton, kaj levis sian glavon kaj tute detranĉis la brakon de la mizera malgrandulo, kiu estas nun en kompatinda stato. Sed la grandulo venis helpi, kaj post mallonga tempo lasis mortigitaj la du sarakenojn. La malgrandulo pro venĝo detranĉis la kapojn.

Ili serĉis alian aventuron, kaj nunfoje batalis kontraŭ du malbonaj satirusoj kiuj forportis malfeliĉan knabinon. La malgrandulo ree estis batalema, sed faris nur unu baton, ricevante por ĝi bategon kiu detruis al li unu okulon. Sed la grandulo baldaŭ atingis la batalon kaj se ili ne estus forkurintaj li mortigus la du satirusojn. La kamaradoj ĝojegis pri sia venko, kaj la savita fraŭlino enamiĝis je la grandulo kaj edziniĝis je li.

Ili nun vojaĝis en malproksiman landon, ĝis ili renkontis rabistojn. Tiujfojon la batalo daŭris tre longe. Kie ajn la grandulo batalis ĉiuj estis venkataj, sed la malgrandulo estis preskaŭ mortigita pli ol unu fojon. Fine la vojaĝantoj havis la venkon. La malgrandulo estis perditaj brakon, kruron kaj okulon, dum la grandulo ne havis eĉ unu vundon. Tial li ĉekkriis al sia kunulo:

"Mia heroeto, tiu ĉi estas glora sporto!

Ni faru alian venkon kaj tiam ni havos gloron por ĉiam."

"Ne!" respondis la malgrandulo, kiu fariĝis pli saĝa. "Mi ne plu partoprenas en batalado, ĉar mi vidas, ke en ĉiu batalo vi ricevas la tutan honoron kaj rekompencon, sed la batoj falas tute sur min!"

## ORIENTAJ FABELOJ

Unu avarulo diris, al amiko sia, "Mi nun posedas mil rupiojn, kiujn mi enterigos ekster la urbo, kaj tiun ĉi sekreton mi diros al neniu krom vi." Ili kune eliris el la urbo kaj enterigis la monon sub arbo. Post kelke da tagoj, la avarulo sola iris al la arbo, sed trovis nenan signon pri sia mono. Li diris al si: "Krom tiu amiko, neniu tion forigis; sed se mi lin demandos, li neniam konfesos." Li iris tial al lia domo kaj diris: "Amiko mia, multe da mono mi antaŭnelonge ricevis, mi volas kaŝi sur la sama loko. Se vi venos morgaŭ, ni iros kune." La amiko, avidante tiun ĉi grandan sumon, remetis la alian monon, kaj la avarulo la morgaŭan tagon iris tien sola kaj trovis sian monon. Li ĝojegis pro sia elpensajo kaj neniam poste metis iom de konfido en amikoj.—*Jotojo, en British Esperantist.*

## LA SERCEMULO ELSERCATA

Antaŭ iaj kvardek jaroj, amiko diris al mi la sekvantan rakonton:

Botanikisto konata havis tre naivan amikon, kiu ŝatis fari ŝercojn. Unu tagon li donacis al la sciencisto kelkajn neordinarajn semojn por kulturi en varmejo. Efektive tiuj ĉi tute ne estas kreskaĵsemoj sed fiŝfrajo el piklita haringo. Post privata esploro de la globetoj, mikroskopa kaj pergusta, li faris konkludon. Post tri monatoj, la ŝercemulo estis invitita ekzameni la kulturitajn rezultatojn. En la kreskaja varmejo li estis mirigata vidi zorge ŝirmitajn sub vitraj kloŝoj tri ruĝajn haringojn ŝajne kreskantajn el la tero en florpotoj. Nu, nu, estas mirinde! li diris, mi neniam kredis, ke ili kreskos, sed nur intencis fari ridigan ŝercon kontraŭ vi.—*Robert Sutcliff, en British Esperantist.*

# EN ESPERANTA RITMO

## HO, LINGVO BELA!

Kanto, alfarita al la melodio "Dixie" de  
*Prof. Frank H. Loud*

### I

Ho, lingvo bela Esperanto!  
Jen mi staras, batalanto,  
Apud vi, kaj kun vi, kaj por vi, tute vi!  
Ĉar kiel mi pli bone farus,  
Se mi ne fidele starus  
Apud vi, kaj kun vi, kaj por vi, tute vi!

La kara verda stelo—por mi! por mi!  
Espero alta estas vi  
La mondon lumiganta,  
"Jen mi, de vi  
La brilon koramanta!"

### II

Gefratoj miaj samcelantaj,  
Por la paco laborantaj,  
Ho! kun mi, apud mi, staru vi, tie ĉi!  
Vi kiuj venkas la malbonon,  
Alportante riĉan dono,  
Ho! kun mi, apud mi, staru vi, tie ĉi!

La kara verda stelo—por ni! por ni!  
Espero brila estas ĝi  
De la homarservantoj,  
"Kaj ni, de ĝi  
Ĉiamaj amegantoj!"

### III

Sur Zamenhofa fundamento  
Ni firmiĝos spite vento!  
Spite ĝi, kontraŭ ĝi, staros ni, tie ĉi!  
Helpante nun, kaj nun kontraŭen  
Blovas ĝi, sed ha! antaŭen  
Spite ĝi, kontraŭ ĝi, iros ni, venkos ni!

La kara verda stelo—por ni! por ni!  
Espero sola estas ĝi  
De monduigantoj;  
"Kaj ni, de ĝi  
Por ĉiam la servantoj!"

## KANTO

(Ario: *Ja vi elster dette landet*)

Jes, ni amus ĉiun landon  
Sur la tuta ter'  
Se ni sciuss Esperanton,  
Lingvon de l'esper'.  
Amu, lernu ĝin kaj kantu  
Pri la sankta cel'—  
Tra la mondo ĉiam lumu  
Nia sankta stel'!

Ja ni sentas malkomprenon  
Ĉesi en la kor',  
Ĉar atendas nin la regno  
De plej granda glor'.  
Jen alnaĝas blanka velo  
Laŭ ebena mar'—  
Goju, goju ĉiu homo,  
Kune angelar'!

—*Leo Nordrum.*

## ĈIELO BELA.

Ĉielo bela, dolĉa, kara,  
Ni serĉas vin.  
Lace sopiras ni.  
Okuloj niaj esplorantaj,  
Oreloj ĉiam aŭskultantaj,  
Deziras vin.  
Feliĉa land', al vi  
Se malkuraĝo estas vere

En nia kor',  
Animon novan al ni donas,  
Kaj pro la pekoj nin pardonas,  
La Bonsinjor'.  
Ĉiela dom', al vi  
Gojege venos ni.

Ja vere estas vi l' espero  
De ĉia hom'.  
L' espero la futuron kronos;  
En gloraj himnoj ĉiam sonos  
La via nom'.  
Ho Paradiz', en vi  
Fervore kantos ni.

—*Herbert Harris.*

## PRI ESPERANTA VORTFARADO

La antaŭparolo al la *Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca* enhavas multe da bona konsilo por Esperantistoj. Pro tio, ke Sro. Boirac preparis la vortaron, la antaŭparolado devas enhavi la frukton de la spertoj kaj konsiloj de la Akademio, ĉar Sro. Boirac estas la ĉefo de tiu korpo. La tuta antaŭparolo estas tro longa por reprodukto tie ĉi, sed ni represas entute unu el ĝiaj ĉapitroj. (Pri aĉeto de la *Vortaro*, vidu nian konstantan liston da libroj vendataj).—*Redakcio.*

Laŭ la metodo kaj ekzemplo de Dro. Zamenhof en *Universala Vortaro* ni al-lasis en nia Plena Vortaro ne nur la radikvortojn sed ankaŭ la finiĝojn kaj afiksojn. Pri tiuj ĉi lastaj ne estos sen-utile prezenti kelkajn rimarkojn.

Kompreneble oni trovas tie ĉi la tutan afiksaron elpensitan de la Majstro; kaj ni penis klarigi kiel eble plej precize la signifon kaj oficon de ĉiu afikso en ĝia alfabeto loko. Sed ŝajnas al ni, ke por plene kompreni tiun ĉefan parton de la Zamenhofa kreaĵo, oni devas konsideri la afiksojn ne aparte unu de la alia sed kontraŭe laŭ iliaj interrilatoj kaj kvazaŭ membrojn de unu nedividebla tutaĵo.

Laŭ nia opinio, oni povas distingi inter ili du grandajn kategoriojn. Unuflanke estas *universalaj* afiksoj, kiuj povas kuniĝi kun ĉiuspecaj radikoj, verbaj, substantivaj aŭ adjektivaj, kaj povas same naski ĉiuspecajn vortojn derivitajn, verbojn, substantivojn aŭ adjektivojn. Aliflanke estas pli malpli *specialaj* afiksoj, kiuj kuniĝas prefere aŭ eĉ ekskluzive kun unu speco de radikoj, ĉu verbaj, ĉu substantivaj, ĉu adjektivaj, kaj naskas, almenaŭ senpere kaj primitive, nur unu specon de vortoj derivitaj, ĉu verbojn, ĉu substantivojn, ĉu adjektivojn.

Kiel oni vidas, ni starigas kiel esencan principon de Esperanto la specifikan diversecon de ĝiaj radikoj. Tiu principo ŝajnas unuavide kontraŭa al la cirkon-

stanco, ke *Universala Vortaro* entenas krudajn radikojn sen finiĝoj kaj sekve sen gramatikaj diferencigoj; de kio oni eble povus konkludi, ke ili estas per si mem indiferentaj al ĉiu gramatika signifo, ke ili estas gramatike neŭtralaj, kaj ke sekve ili estas kapablaj vesti kun egala facileco ĉiujn gramatikajn diferencigojn, ĉu verbajn, ĉu substantivajn, ĉu adjektivajn. Sed tiu cirkonstanco venas nur de tio, ke *Universala Vortaro* estas antaŭ ĉio difinita por faciligi al neesperantistoj la tujan analizon kaj komprenon de esperantistaj tekstoj; kaj oni povas nenion konkludi de tio pri la efektiva strukturo de la lingvo. Estus facile montri, ke la radikoj de *Universala Vortaro* regule dispartiĝas en diferencajn kategoriojn t. e. verbajn, substantivajn, adjektivajn, k. t. p., kiel oni povas konstati per la diversnaciaj tradukoj de ĉiu el ili, kaj kiel cetera postulas la naturo mem de la realaĵoj kaj de la homa penso. La principo de la specifika diverseco de la radikoj estas pozitiva, eksperimenta fakto, multe pli grava ol la simple teoria kaj subjektiva regulo (ne principo) de returnebleco, kiun kelkaj malprave pretendis kontraŭstarigi al ĝi.

La *universalaj* afiksoj en Esperanto estas kvar, kiuj servas ĉu por altiĝi, ĉu por malaltiĝi ian econ, agon, estaĵon ĝis la plej ekstrema grado, ĉu eĉ por maligi kaj austataŭi ĝin per io kontraŭa, ĉu por aludi ian ajn rilaton kun ĝi.

Ili estas la sufiksoj *eg*, plejgrandiga; *et*, malplejgrandiga; la prefikso *mal*, inversiga; kaj fine la sufikso *um*, sen difinita senco. Ekzemple: *varmega*, *varmeta*, *malvarma*, *fermeti*, *fermegi*, *malfermi*; *orumi*, *kolumo*, *proksimuma*, k.t.p.

Oni povos ankaŭ meti en tiun klason la novan sufikson *aĉ*, kiu estas kvazaŭ *morale* malplejgrandiga, kaj aldonas malŝatan nuancon al ĉiuspeca radikoj, kun kiu oni kombinas ĝin: *domaĉo*, *obstinaĉo*, *ridaĉi*, k. t. p.; kaj oni povus teorie imagi sufikson *morale* plejgrandigan, t. e. aproban,



laŭdan, k. t. p.; sed tiu sufikso saĝnas praktike senutila, ĉar oni renkontas ĝin en preskaŭ nenia lingvo (komparu tamen en la franca lingvo: *grand, grandiose*). Aliparte la adverbo *ne*, la prepozicio *sen*, uzataj kiel prefiksoj, ludas rolon tute kompareblan al tiu de la afikso *mal* (komparu *neutila, senutila, malutila*).

La *specialaj* afiksoj dividiĝas nature en tri specojn: (1) *verabaj*, t. e. naskantaj unualoke kaj senpere verbojn (kaj ankaŭ sed ne senescepte, kuniĝantaj prefere kun verbaj radikoj); (2) *adjektivaj*, t. e. naskantaj unualoke kaj senpere adjektivojn; (3) *substantivaj*, t. e. naskantaj unualoke kaj senpere substantivojn.

La unua klaso entenas la tri sufiksojn: *ad, ig* kaj *iĝ*.—Pri “*ad*” oni povas rimarki, ke ĝi kuniĝas, ĉu kun verbaj ĉu kun nomaj, neniam kun adjektivaj radikoj. Kiam ĝi kuniĝas kun verbaj radikoj, ĝi naskas derivitajn verbojn, kiuj aldonas al la senco de la primitiva verbo nuancon de ripeto; daŭro, kutimo: ekz: *kanti, kantadi; pafi, pafadi; vivi, vivadi*, k. t. p. Kiam ĝi kuniĝas kun nomaj radikoj, oni povas dubi, ĉu ĝi naskas unualoke verbojn (kies signifo ne multe diferencas de la verboj senpere derivitaj de la tiuj samaj radikoj: *kroni, kronadi; tamburi, tamburadi*, k. t. p.) aŭ ĉu ĝi ne naskas pli ĝuste nomojn verbajn: t. e. ĉu ĝi ne aldonas al la primitivaj substantivoj novan senco de agado: *krono, kronado; tamburo, tamburado*, k. t. p. Sed ĉiumaniere la sufikso *ad* havas esencan rilaton kun verba ideo.

La sufiksoj *ig* kaj *iĝ* kuniĝas kun substantivaj kaj adjektivaj radikoj por naski derivitajn vortojn; kaj tio ĉi enhavas nenian malfacilaĵon, kiel ekz: *ŝtonigi, ŝtoniĝi; virigi, viriĝi; paliĝi, paliĝi; fortigi, fortiĝi*, k. t. p. Sed la afero estas iom pli malfacila, kiam la kuniĝo estas kun verbaj radikoj: kiel ekz: *veniĝi, faliĝi, dormiĝi, fariĝi, kantiĝi, veniĝi, faliĝi, dormiĝi, fariĝi, kantiĝi*, k. t. p. Ni ne povas tie ĉi diskuti detale la demandon; sed ni nur atentigos nian legantojn pri la neceseco uzi tiujn du sufiksojn (kiel cetero ĉiujn sufiksojn), nur en okazo de efektiva bezono. Tre ofte (precipe, ŝajnas al ni, en la britaj esperantistaj verkoj), la formoj kun *ig* kaj *iĝ*

anstataŭas tute senutile kaj eĉ malutile la simplajn formojn: oni ne vekas, oni *vekigas iun*; io ne estas naskita, sed *naskiĝita*, k. t. p. Same oni *haltigas, dromigas*, k. t. p. anstataŭ *halti, dromi*, k. t. p.

Al tiuj sufiksoj oni proponis de longa tempo, precipe inter la sciencistoj kaj teknikistoj, aldoni novajn sufiksojn samspecajn t. e. verbajn, por devenigi pli precize verbojn de substantivaj radikoj. Ekz: *iz* antataŭ *um* aŭ simpla *i*: *elektrizi, orizi, arĝentizi*, k. t. p. Sed ŝajnas, ke en la komuna lingvo, kiu ne bezonas matematikan precizecon, tiaj sufiksoj estas ŝarĝo pli ol helpo. Oni ne uzas razilon por tranĉi lignon.

La afiksoj *adjektivaj* estas *abl, em, ind*, kiuj kuniĝas ekskluzive kun verboj, ekz: *kredabla, kredema, kredinda; videbla, videma, vidinda*, k. t. p.

La unua prezentas senco pasivan kaj signifas: kiun oni povas kredi, vidi, k. t. p. aŭ kiu povas esti kredata, vidata, k. t. p. Sekve ĝi povas kombiniĝi nur kun aktivaj verbradikoj: formoj kiel: *establa, povebla, vivebla, mortebla*, havas nenian signifon (nur se oni aktivigas okaze kelkajn el tiuj verboj, ekz. se *vivebla* signifas: ne, kiu povas vivi, sed, kiun oni povas vivi: *tia vivo ne estas vivebla*). La aktiva sufikso responda al *abl* ne ekzistas en Esperanto: oni ĝis nun uzis anstataŭe, ĉu la radikojn *pov, kapabl*, kiel ekz: *vivopova, pagokapabla*, ĉu la sufikson *em*, kiam la diferenco inter kapablo kaj inklino ŝajnas negrava kaj neententinda, kiel ekz: *mortema, brulema*, ĉu la simplan finiĝon *a*, kiel ekz: *instrua, nutra*, k. t. p.—Oni tamen proponis, precipe inter filozofoj kaj sciencistoj, enkonduki novan sufikson *iv* kun tiu speciala senco: ekz: *voliva, sentiva, aŭdiva, vidiva*, k. t. p, signifus kapabla voli, senti, aŭdi, vidi, k. t. p. kaj naskus la abstraktajn nomojn: *voliveco, sentiveco, aŭdiveco, vidiveco*, k. t. p. kiujn ŝajnas bezoni la filozofio kaj naturaj sciencoj.

El la du ceteraj *id* kaj *ind*, la unua prezentas senco aktivan kaj respondas al la proponita *iv*; sed ĝi signifas pli ol simplan povon aŭ kapablon t. e. efektivan inklinton, “tendencon,” tiel ke “mortema” laŭvorte estas ne nur “kiu povas morti” sed eĉ “kiu celas, deziras, volas morti.”

La dua "ind" respondas al "ebi" almenaŭ en tio, ke ĝi havas ankaŭ sencon pasivan. "Laŭdinda, kredinda" signifas "kiu meritas, ke oni laŭdu, kreu ĝin aŭ kiu meritas esti laŭdata, kredata" k. t. p. Ĉu oni povus doni al ĝi la sencon proksiman kaj analogan: "kiu devas esti," aŭ ĉu estos necese, kiel opinias kelkaj aŭtoroj, enkonduki novan sufikson, kiel "end" for tiu ofico? Tio estas demando, kiun solvos nur la praktiko kaj komuna uzado. Ĝis nun oni uzis por esprimi la diritan sencon, krom "ind," ĉu la partician finigon "ot" kiu aludas estontecon pli ĝuste ol devigecon, ĉu kummetitajn formojn kiel ekz: "La afero estas por fari tuj: mi havas tri leterojn por skribi antaŭ ol forveturi" k. t. p. Eble la rimedoj jam ekzistantaj sufiĉas sen aldono de nova komplikaĵo, des pli ke oni ne havas tre oftajn okazojn elparoli tiujn iom specialan ideon.

Sed ĉu adjektivoj povas deveni nur el verboj? ĉu oni ne povus ankaŭ devenigi kelkajn el nomoj aŭ adjektivoj? Se ni konsideras la aferon el tute teoria vidpunkto, la respondo estas certe jesa; sed ni ne devas forgesi, ke lingvo estas des pli bona praktike, ju pli simpla kaj facila ĝi estas, sekve ke ĝi entenas kiel eble plej malgrandan nombron da afiksoj t. e. nur la necesegajn afiksojn. Teorie do oni povas elpensi afiksojn nomadjektivajn, kiel ekz, por signifi: ĉu apartenanta al io nomita, aŭ havanta en si ion nomitan, aŭ similantan al ĝi. k. t. p.; sed la demando estas, ĉu tiuj pensuancoj estas sufiĉe gravaj kaj renkontiĝas sufiĉe ofte en la parolado por ke oni nepre bezonu specialajn signojn por ili.

Pri la dua senco "apartenanta al io nomita" speranto ĝis nun devenigis adjektivojn de primitivaj substantivoj nur per sangno de finiĝoj: ekz: *reĝa palaco*, t. e. palaco de la reĝo; *suna lumo*, t. e. lumo de la suno; kaj neniam en la praktiko rezultis el tio ĉi eĉ la plej malgranda malfacilaĵo. Estas do tute senutile nuligi senfinan nombron da similaj formoj kiel *reĝa, suna*, k. t. p. kaj deklari ilin senencaj kaj austataŭmeti formojn komplikajn, kiel *reĝala, sunala*, k. t. p. nur por kontentigi pure teoriajn postulojn.

Pri la dua senco "havanta en si aŭ sur

si aŭ kun si ion nomitan," ŝajnas, ke oni proponis novan sufikson nur en okazo de "multhaveco." Ekz. la sufikso "oz," jam de longe proponita kaj eĉ uzita de scienculoj kaj teknikistoj por tiu ofico, signifas ne "kiu havas simple ion nomitan," ekzemple, florojn, fruktojn, branĉojn, kornojn, k. t. p. sed "kiu havas multe da ĝi." Por esprimi la unuan el tiuj du sencoj, Esperanto uzas la radikojn *hav*, *port*, kiel ekz: *kornhava, fruktoporta* k. t. p. Eble oni povus ankaŭ uzi la prepozicion "kun" kiel prefikson, same kiel oni uzas la respondan prepozicion "sen." Se oni diras: kreskaĵo *senflora*, besto *senkorna*, k. t. p., kial oni ne povus diri: kreskaĵo *kunflora*, besto *kunkorna* k. t. p.? Por esprimi la duan sencon, Esperanto ĝis nun uzis same radikojn, *mult*, *plen*, *riĉ*, *don*, ĉu kiel prefikson, ekz: *multangula, multriska, multokula, multorela* k. t. p.; ĉu kiel sufikson, ekz: *stelplena, herboriĉa, oledona*, k. t. p.

Sed povas esti, ke en kelkaj okazoj estus pli oportune havi specialan afikson pli malpezan ol tiuj kunmetitaj vortoj, kaj nenio malhelpas, ke la proponita sufikso "oz" plenumu tiun oficon, se tamen estas interkonsentite, ke ĝia uzado ne estos deviga kaj ke oni uzos ĝin nur en okazo de vera bezono, t. e. por signifi realan, materian multhavecon. Cetere tio ĉi estas afero, pri kiu sendube la Akademio konsiliĝos.

Pri la tria senco: "similanta al io nomita." la sciencistoj havas specialan sufikson "id" kaj "oid" aŭ "ojd" (precipe la zoologiistoj), kiel ekz: *antropojda, arbojda*, k. t. p., sed tiu sufikso estas ekskluzive scienca kaj saĝas ja, ke ĝi ne povas defluigi en la komunan lingvon. Esperanto ĝis nun uzis kunmetitajn vortojn kun radikoj *simil*, *ŝajn*, kiel ekz: *homsimila, arbŝajna*, k. t. p.; aŭ devenigis adjektivojn de abstraktaj nomoj (kiuj estas mem kvazaŭ adjektivoj substantivigitaj), kiel ekz: *sapcca, olccca* (kun la signifo; havanta econ de sapo, de oleo, kvankam ne estante sapo, oleo, sekve iel simila al sapo, oleo, k. t. p.). Saĝas, ke tiuj rimedoj povas sufiĉi sen enkonduko de nova balastero.

Same ne ŝajnas necese havi aldonan sufikson por devenigi adjektivojn el prim-

itivaj adjektivoj. Efektive ĉiu adjektivo signifas: havantan ian econ aŭ kvaliton. Sed ĉiu ajn eco, konsiderata en la havanta ĝin subjekto, nur povas esti ĉu en meza, ĉu en plej alta, ĉu en malplejgranda grado, ĉu inversigita en la kontraŭan econ. Nu la universalaj afiksoj *eg*, *et*, *mal*, sufiĉas por plene esprimi tiujn nuancojn. Estas vere, ke en kelkaj lingvoj ekzistas sufikso por devenigi adjektivojn al aliaj adjektivoj (precipe signifantaj kolorojn). Ekz. france: *bleu*, *bleuatre*; *rouge*, *rougatre*, k. t. p. Sed por tiel malvasta ofico ĉu estas necese enkonduki specialan sufikson? Ĉu ne sufiĉas uzi, kiel oni faris ĝin nun, la kunmetitajn formojn, *dubeblua*, *duberuja*, aŭ la universalan sufikson *et*, kiu ŝajnas al ni tute taŭga, ĉar la franca "bleuatre" signifas: "kiu estas preskaŭ sed ne plene, ne vere blua, do *blueta*"; tute same kiel "*varmeta*" signifas: "kiu estas preskaŭ sed ne plene, ne vere varma"?

Nun ni transiras al la substantivaj afiksoj, kiuj povas ankaŭ dividiĝi en du klasojn:

1. Afiksoj por devenigi nomojn de aferoj, objektoj.

2. Afiksoj por devenigi nomojn de personoj (aŭ eĉ de bestoj).

En la unua klaso troviĝas:

1. Sufikso por substantivigi abstraktajn kvalitojn kaj fari el ili kvazaŭ nemateriajn aferojn, spiritaĵojn: kaj tiu estas la sufikso *ec*, kiu kuniĝas prefere kun adjektivaj radikoj, kiel ekz: *boneco*, *varmece*, k. t. p., sed kiu povas ankaŭ kuniĝi kun substantivaj radikoj, kiel ekz: *homeco*, *dieco*, kaj eĉ kun verboj, kiel ekz: *videco*, *voleco* (precipe en kunmetitaj formoj: *klarvideco*, *senvoleco*, k. t. p.), kredeble en tiuj lastaj okazoj pere de la substantivaj kaj verbaj adjektivoj; *homa*, *dia*, *vida* (*klarvida*), *vola* (*senvola*), k. t. p. Tiu sufikso, kiel oni vidas, estas kvazaŭ meza inter la ĵusantaŭaj kaj la sekvantaj. Ĝi servas por fari *abstraktajn* substantivojn.

2. Sufikso por nomi aferojn, objektojn (ĉu materiajn ĉu eĉ spiritaĵojn, moralajn sed ĉiuokaze konsideratajn kiel ekzistantajn per si mem) laŭ unu el iliaj ĉefaj kvalitoj, elementoj aŭ agoj, uzoj, k. t. p.; kaj tiu ĉi estas la sufikso *aĵ*, kiu

havas la ĝeneralan sencon de afero, objekto (ne, kiel oni tro ofte diras, *materia*, sed *konkreta*) kaj servas do por elfari *konkretajn* substantivojn. Ekz: *blankaĵo*, *altaĵo*, *bonaĵo*, *diaĵo*, *amikaĵo*, *laktaĵo*, *ĥorkaĵo*, *lanaĵo*, *feraĵo*, *trinkaĵo*, *manĝaĵo*, *vidaĵo*, k. t. p.

3. Sufikso por nomi specialan klason de aferoj, objektoj, aĵoj, t. e. ĉiujn aĵojn, kiuj estas difinitaj por helpi al ia faro, ĉiujn instrumentojn, ĉu naturajn, ĉu artajn. Tio estas la sufikso *il*, kiu kuniĝas ekskluzive kun verbaj radikoj, kiel ekz. *flugilo*, *naĝilo*, *komunikilo*, *propagandilo*, k. t. p. Ĝi estas do malpli ĝenerala kaj pli preciza ol ĝi, kvankam en kelkaj okazoj ne estas tre facile scii, kiun el ili oni devas prefere uzi: Ekz: *Via lasta parolado estis tre bona propagandaĵo kaj povos esti por ni tre efika propagandilo*.

4. Sufikso por nomi specialan klason de aĵoj, kiuj entenas en si aŭ portas sur si pli malpli grandan amason da aliaj aĵoj de difinita speco; kaj tio ĉi estas la sufikso *uj*, kiu kuniĝas precipe kun substantivaj radikoj, kaj servas praktike por elfari nomojn ĉu de mebloj, kestoj, vazoj, k. t. p. kiel ekz. *telerujo*, *ĉifonujo*, *abelujo*, *supujo*, *piprujo*, ĉu de arboj, kiel *pomujo*, *ĉerizujo*, ĉu de landoj (sed *nur* kiam oni nomas landon per la nomo de la gento aŭ nacio ĝin loĝanta), kiel ekz. *Francujo*, *Germanujo*, *Anglujo*, k. t. p. Oni trovas ĝin pli malofte kombinita kun verba radikoj, kiel ekz. *manĝujo*, *trinkujo*, *knedujo*, k. t. p.

5. Sufikso por nomi specialan klason de *uj*oj, kiuj entenas aŭ portas nur unu aĵon de difinita speco, kies ekstremaj restas libera. Ĝi estas la sufikso *ing*, kiu kombiniĝas preskaŭ ekskluzive kun substantivaj radikoj, kiel ekz. *cigaringo*, *kandelingo*,  *piedingo*,  *fingringo*, k. t. p. (tamen oni trovas ankaŭ *pendingo*).

6. Sufikso por nomi ĉiun kolekton de aferoj aŭ estaĵoj samspecaj konsiderataj kiel kunestantaj. Ĝi estas la sufikso *ar*, kiu kombiniĝas ekskluzive kun substantivaj radikoj, kiel ekz. *arbaro*, *domaro*, *vagonaro*, *foliaro*, *bovaro*, *gazetaro*, k. t. p.

7. Sufikso por nomi elementon, parton konsistigan de objekto. Ĝi estas la

sufikso *er*, kontraŭparto de la sufikso *ar*, kiu same kiel ĝi kombiniĝas ekskluzive kun substantivaj radikoj, kiel ekz. *akvero*, *fajrero*, *pluvero*, *neĵero*, k. t. p.

8. Sufikso por nomi ĉiun lokon difinitan ĉu por ia ago, ĉu por ia speco de aferoj, bestoj aŭ personoj. Ĝi estas la sufikso *ej*, kiu kombiniĝas kun verbaj aŭ substantivaj radikoj, pli malofte, kaj, ŝajnas, malpli ĝuste, kun adjektivaj, kiel ekz. *lernejo*, *preĵejo*, *kuirejo*, *ĉevalejo*, *bovejo*, *hundejo*, *konsulejo*, *ambasadorĉjo*, *sekretariejo*, *densejo*, k. t. p.

Kelkaj ne tre bone distingas tiun ĉi sufikson de la sufikso *uj*; kaj efektive ili havas inter si kelke da analogeco, precipe se oni konsideras la lastan en la nomoj de landoj, *Anglujo*, *Francujo*, k. t. p.; sed la ĉefa diferenco estas, ke *ujo* estas efektiva, materia, kvazaŭ fizika objekto, samspeco kiel meblo, kesto, sako, arbo, k. t. p., dum *ejo* estas nur loko, spaco, sekve io idea kaj kvazaŭ geometria. Ekz. *abelujo* estas la kestodometo, en kiu loĝas la abeloj; *abelejo* estas la loko en la ĝardeno, kie kunlokiĝas la abeluloj aŭ kunvenas kaj libere vivas inter si la abeloj. Abelujon oni povas tuŝi, porti, renversi, k. t. p., tute ne abelejon.

Restas nun por ekzameni la sufiksojn uzatajn por elfari nomojn de personoj.

La plej generala el ĉiuj, kiu respondas al la sufikso *aj* inter la aferaj nomsufiksoj, estas la sufikso *ul*, kiu signifas persono, vivanta individuo, same kiel *aĵ*, signifas objekto, nevivanta afero. Ĝi aliĝas kun radikoj verbaj, substantivaj, kaj adjektivaj sed prefere kun tiuj du lastaj; ekz. *banulo*, *dormulo*, *garantiulo*, *ĝibulo*, *religiulo*, *ftizulo*, *blindulo*, *riculo*, k. t. p. Efektive la partcipaj finiĝoj *ant*, *int*, *ont*, *at*, *it*, *ot*, plej ofte konkurencas kun ĝi por la kombiniĝo kun verbaj radikoj: oni trovas pli ofte *dormanto*, *leganto*, ol *dormulo*, *legulo*, k. t. p.

Sed inter la "uloj" estas kategorioj, kiuj ebligas pli precizan montron de la nomataj personoj. Unu el ili estas la profesio, la kutima okupiĝo, kaj al ĝi respondas la sufikso *ist*, kiu kombiniĝas kun radikoj jen verbaj, jen substantivaj: kiel ekzemple *kuiristo*, *forĝisto*, *plugisto*, *panisto*, *viandisto*, *dentisto*, k. t. p. Dua

estas la societo al kiu la nomita persono apartenas, la doktrino kiun ĝi sekvas; kaj al tiu kategorio respondas la sufikso *an*, kiu kombiniĝas nur kun radikoj substantivaj, ĉu de aferoj (societo, lando, doktrino), ĉu de personoj (religiestro, skolestro, k. t. p.), kiel ekz. *familiano*, *grupano*, *urbano*, *aziano*, *afrikano*, *samreligiano*, *samideoano*, *kristano*, *mahometano*, k. t. p.

Ni povas tamen rimarkigi, ke pro troa obeemo al la kapricaj kutimoj de la naciaj lingvoj, tiun lastan sufikson tre ofte kaj tute erare anstataŭas la antaŭa. Oni ne diras *kongresisto* anstataŭ *kongresano*, sed oni ne maltimas diri *esperantisto*, kiam la ĝusta vorto estus sendube *esperantano*; *budhista*, *kalvinista*, anstataŭ *budhano*, *kalvinano*, simile al *kristano*, *luterano*, k. t. p.

Apud tiuj sufiĉe ĝeneralaj afiksoj havas lokon pli specialaj, kiel *estr*, *ĉef*, *in*, *id*, *edz*, *bo*, *ge*, *ĉj*, *nj*, k. t. p., kiuj aliĝas nur al substantivoj por elfari nomojn de personoj, individuoj, konsiderataj laŭ iliaj sociaj aŭ familiaj interrilatoj: ekz. *regnestro*, *imperiestro*, *ĉefministro*, *ĉefepiskopo*, *patrino*, *reĝido*, *reĝinedzo*, *bofilo*, *gefratoj*, *paĉjo*, *Joĉjo*, *panjo*, *Manjo*, k. t. p.

Nun la demando estas, ĉu estas necese aldoni novajn substantivajn sufiksojn al la ĉi supra listo. Ekzamenante la internaciajn vortojn de substantiva speco prunteprenitajn de Esperanto el la ĉefaj kulturaj lingvoj, ni konstatas, ke multaj el ili prezentas konstantajn finiĝojn tute similajn al sufiksoj; kaj tiuj kvazaŭsufiksoj estas, *acio*, *ismo*, kaj *oro* (tiu ĉi lasta ankaŭ sub la formo *atoro*). Ni citu kiel ekzemplojn: *abnegacio*, *administracio*, *arbitracio*, *civilizacio*, *deklaracio*, *delegacio*, *disertacio*, k. t. p.; *absolutismo*, *alkoholismo*, *anakronismo*, *anarkismo*, *antagonismo*, *asketismo*, *ateismo*, *katolicismo*, k. t. p.; *administrato*, *aktoro*, *ambasadoro*, *iniciatoro*, *profesoro*, *direktoro*, k. t. p.

Ĉu, anstataŭ multigi senfine tiaspecajn nomojn, ne estus pli bone ilin devenigi regule de pli simplaj radikoj, akceptante la finiĝojn *acio*, *ismo*, kaj *oro* (au *atoro*) kiel efektivajn sufiksojn? Des pli ke tiuj simplaj radikoj jam troviĝas plej

ofte en la Esperanta vortaro. Ekzemple, flanke de *administracio*, *absolutismo*, *administratoro*, *civilizacio*, *alkoholismo*, *deklaracio*, *delegacio*, *anarkismo*, *asketismo*, *iniciatoro*, *direktoro*, ni havas ankaŭ la pli simplajn vortojn: *absoluta*, *administri*, *civilizi*, *alkoholo*, *deklari*, *delegi* *anarkio*, *asketo*, *iniciati*, *direkti*, k. t. p.

Bedaŭrinde tiu paraleleco ne ĉiam ekzistas: ekzemple ni ne havas la simplajn radikojn *abneg*, *disert*, *anakron*, *antagon*, *ate*, *ambasad*, *profes*, k. t. p., por respondi al *abnegacio*, *disertacio*, *anakronismo*, *antagonismo*, *ateismo*, *ambasadoro*, *profesoro*, k. t. p.

Plie la senco de tiuj kvazaŭsufiksoj ne povas esti difinita laŭ unuforma kaj konstanta maniero. Ekzemple *acio* havas tre ofte la saman sencion kiel la verba sufikso *ad*: *navigacio* plene egalvaloras *ŝifveturado*; *abnegacio* povus tradukiĝi per *sinforĝesada*, k. t. p.; sed en aliaj okazoj ĝi havas la sencion jen de *antaro*, jen de *ejo*. *Administracio*, kiam ĝi ne signifas *administrado*, signifas aŭ *administrantaro* aŭ *administrarejo*: ŝajnas do tre malfacile uzi tiun finiĝon kiel efektivan sufikson. Sed estus sendube pli bone, se oni anstataŭigus ĝin, kiel eble plej ofte, per la veraj Esperantaj sufiksoj: se oni dirus: *administristo*, *administrado*, *administrantaro*, *administrarejo*; *deklaro*, *deklarado*, *deklararejo*; *civilizo*, *civilizado*, *civilizeco*, *civiliziteco*, *civilizitaro*, k. t. p. anstataŭ *administracio*, *deklaracio*, *civilizacio*; eĉ se oni ĉiam elektus kiel radikojn la pli simplajn formojn, kiel ekzemple *abneg*, *disert*, k. t. p. anstataŭ *abnegacio*, *disertacio* k. t. p.

Same *ism* havas en la naciaj lingvoj tre diversajn sencojn. Ŝajnas, unuavide, ke en ili ĝi respondas tre ofte al la sufikso *ist*: france *bouddhisme*, *bouddhiste*; *calvinisme*, *calviniste*, k. t. p.; ĉar en tiuj lingvoj *ist* ne signifas nur, kiel en Esperanto, profesion, kutiman okupiĝon, sed ankaŭ pli ofte komunan kredon, doktrinon. Kvankam nur erare oni uzis en Esperanto la sufikson *ist* por signifi "partiano de ia politika, religia aŭ filozofia doktrino" kaj la ĝusta sufikso en tiu okazo estas *an*, tamen la sufikso *ism*

povus esti proponata por signifi "doktrinon, sistemon sekvatan de ia anaro." Ekz. *platonismo*, doktrino de Plato aŭ de la Platonanoj; *aristotelismo*, doktrino de Aristotelo aŭ de la Aristotelanoj; *mahometismo*, doktrino de Mahometo aŭ de la Mahometanoj; *budhismo*, doktrino de Budho aŭ de la Budhanoj (ne Budhistoj), k. t. p. Bedaŭrinde *ism* signifas ankaŭ multajn aliajn aferojn krom doktrino. En *alkoholismo*, *artritismo*, k. t. p. ĝis signifas ian econ aŭ emon de homa temperamento. Ĉu *alkoholismo*, *artritismo*, ne egalvaloras *alkoholuleco*, *artrituleco*? En *magnetismo*, *organismo*, ĝi havas ankoraŭ malsimilajn sencojn: *magnetismo* estas ĉu magneta forto, ĉu magneta fenomenaro; kaj tre certe *organismo* ne estas io alia ol *organaro*. Pro tiaj kaŭzoj estas tre malfacile uzi *ism* kiel difinitan sufikson, kaj eĉ ŝajnas dezirinde, ke oni kiel eble plej evitu enkonduki sen neceso novajn radikojn kun *isma* finiĝo.

Pri *oro*, *atoro*, la ĉefa kontraŭparolo estas, ke ĝi senutile duobligas la jam ekzistantajn *anto*, *ulo isto*; ĉar ĝi havas tute la saman sencion. Kio estas *administratoro*, *iniciatoro*, *redaktoro*, *direktoro*, k. t. p. se ne *administranto*, *iniciatanto* aŭ *iniciatulo*, *redaktisto* aŭ *redaktanto*, *direktanto* aŭ *direktisto*, k. t. p.? Sed tie ĉi ankaŭ oni povus esprimi la deziron, ke la verkistoj kaj vortaristoj ne enkonduku sen efetiva bezono novajn nomojn kun "atora" finiĝo kaj preferu aligi al simplaj radikoj la klasikajn esperantajn finiĝojn.

Oni povas tamen diri, por senkulpiĝi kiel eble la enŝovigon de tiuj "aciaj," "ismaj" kaj "atoraj" formoj en la Esperanta vortaro, unue ke ili estas internaciaj, due, ke ili apartenas preskaŭ senescepte, ne al la komuna lingvo, sed al la speciala idiomato de la scienculoj, kleruloj, k. t. p., kaj ke la internacieco povas sen granda malutilo superi la simplecon kaj regulecon, kiam la demando estas ne pri la komuna lingvo sed pri tiu speciala idiomato, des pli ke lingvo internacia tute ne devas celi teoriantan perfektecon, sed sufiĉas ke ĝi estu praktike plej oportuna por ĉiuj kategorioj de homoj ĝin uzantaj.

## AMO KIEL KURACILO.

Unu riĉulo, preskaŭ ĉiam malsama, vojaĝis en diversaj fremdaj landoj, konstante serĉante sanon. Konsultante preskaŭ ĉiun faman kuraciston, li elspezis sian tutan havon. Ĉiu doktoro nomis la malsanon per nova latina nomo, kaj ĉiuj malgaje diris: "Ho, mi forte bedaŭras ĝin diri al vi, kara sinjoro, sed vi ja nelonge vivos."

Fine li hejmen iris por malbeni sian abomenindan sorton. Dum la hejmvoyaĝo li renkontis fremdulon, al kiu li rakontis pri sia malfeliĉego. Tiu lin aŭskultis atente, kaj poste klarigis la kaŭzon de l' malfeliĉo.

Iom post iom nia eksriĉulo interesiĝis je la saĝaj diroj de sia kunvojaĝanto, kaj sekve amikiĝis je li.

Je l' foriro la fremdulo konsilis la jenon: "Se efektive vi volas regajni vian sanon, kara sinjoro, jen rimedo: vi *ĉesu malamadon, kaj komencu amadon*; amu ĉiun kaj ŝatu ĉion; ekmemoru: ĉiuj kreitaĵoj de l' universo estas kreitaj de la sama Kreinto; ĉiuj estas kreitaj por sin reciproke feliĉigi; la Spirito de l' Kreinto vivadas en ĉiuj; sekve ĉiuj estas fundamente bonaj, kaj kune laboradas por bono.

Vi havas malamikojn, he? Nu, tio nur montras ke vi amis nesufiĉe. Komencu ilin ami, kaj, mi diras al vi, tiel certe, kiel neĝo fluidiĝas sub la varmaj radioj de la brilanta suno, kaj tiel certe, kiel lumo forigas mallumon, vi la malamikojn venkos."

"Neeble!" respondis nia eksriĉulo, "neeble! tro multe postulite! do kiel povas mi ami tiujn kuracistaĉojn kiuj englutis mian tutan havon kaj nek eĉ provis min kuraci; je l' fulmotondro! estus kvazaŭ ami la diablon mem!"

"Nu, mia kara sinjoro, trankvile respondis la fremdulo, "estas negrave ĉu vi al ĝi kredas aŭ ne; vi nur provu ĝin, daŭrigu la provadon ĉiutage kaj notu la rezultaton."

Alveninte en sia hejmo, nia eksriĉulo profundigis en meditado; poste li tre scivoliĝis ĉu la rimedo kiun konsilis al li tiu fremdulo efektive utilis, se konfide aplikita, kaj li firme decidis provadi ĝin.

Post kelka tempo, je l' mirego de li mem kaj liaj konatuloj, nia eksriĉulo tute resaniĝis kaj feliĉiĝis.

Jen la simplega recepto—*ĉesu malamadon, kaj komencu amadon*, kiu sola povis ellabori la miraklon!

—Verkis *M. J. Gartner*.

## LA JUSTA DIVIDO.

Kiam Pingo Pongo reĝo de Ĥinuĵo mortis kaj lia testamento legiĝis, eltroviĝis ke inter aliaĵoj restis al la tri reĝidoj, Haj Li, Haj Lo kaj Pi Pi, admirinda aro da elefantoj kiu, laŭ la testamento, devas dividiĝi inter la tri reĝidoj jene: Haj Li la plej maljuna filo devas havi duonon de la tutnombro, Haj Lo la dua filo, devas havi kvaronon, kaj Pi Pi la plej juna devas havi kvinonon. Sed kiam ili venis por apartigi la elefantojn ili eltrovis ke la nombro estis deknau kaj, sen pecigado de unu elefanto, ili ne povus dividi ilin, kaj certe pecigita elefanto ne estas utila. Longtempe ili pripensis pri la afero sed ili ne povis solvi la problemon. Fine ili iris al Tu Lu la ĉefveziro, kaj petegis lin ke li helpu ilin. Zorgeme Tu Lu pesis la aferon kaj la duan tagon li enkondukis sian propran elefanton en la kampon kie troviĝis la reĝaj elefantoj. "Nun," li diris al Haj Li, vi povas preni vian duonon kiu estos dek; ci, Haj Lo, havu vian kvaronon, kvin; kaj vi Pi Pi, jen estas via kvinono, kvar. Tiam Tu Lu forkondukis hejmon sian beston, kaj ĉiuj estis feliĉaj.—*H. Hall*.

## A NEW WORD SUGGESTED

I find in the new language that no distinction is made between the Second Personal, Singular, and Plural pronoun. The word "vi" means one person or two persons. It seems a very easy matter to wonderfully improve this weak place by the use of the "vi" for the singular number, and the word "ji" for the plural. Almost everyone will at once recognize this word as the old word "ye" which means more than one person. I like the rest of the language very much, but think that double meanings should be avoided as much as possible.—*D. T. Armstrong, Wichita, Kansas*.

# STRICTLY CONFIDENTIAL

**T**HIS MAGAZINE is in the hands of optimists. If it had not been, it wouldn't be in existence. But we want to confess that for once the results of a plan have commenced to outgrow our most optimistic expectations. This relates to Mr. Baker's propaganda lecture tour through the states east of the Mississippi. The editor of *Amerika Esperantisto* is a lyceum man, with a pronounced liking for the "road," and the only reason he had not been out among you before was that he was waiting to make the trip to Europe, to see an Esperanto congress and talk from personal experience.

But we were not prepared, even after the successful tour through the West, for such a flood of inquiries and requests for engagements. It is almost an axiom with lyceum bureaus that "you can't close engagements by mail." We don't believe it! One delivery today brought us three, and in yesterday's mail there were five. A little more of this and every night of April and May will be taken. You can easily believe there's some joy in this office.

However, this advertisement is written just to remind those who haven't been able to close as yet, that there is still a little time and a few engagements open. Our announcement last month asking all to close by the 20th should have made some distinction as to location.

Mr. Baker, who lectures at Cedar Rapids, Iowa, on March 31, will start eastward April 6, and the first week will be taken by Ohio and West Virginia. Thus, committees from those states should close engagements at once by telegraph.

Those who wish to "work up" propaganda meetings in western Pennsylvania and New York, however, will have a little more time, though they should report by letter up to March 30, or tele-

graph April 1, so that plenty of time can be given to dating and routing. New England will have a week longer, but it cannot be too often repeated that early decision, giving time for elaborate study of the route, is most important. It is yet to be decided whether the route will be from New York City north to Portland, or across northern New York state to Portland and down the coast via Manchester, Boston, etc.

Still more time will be available for New Jersey, eastern Pennsylvania, and the states farther south, *except*—if engagements keep on coming in, the tour is going to extend into June, and we certainly won't ask those who accept engagements for May to take a June date unless they want it.

Mr. Baker does his own routing. Those of you who are expecting to close eleventh-hour dates should write us that you are working on the proposition, and we will mail you advance bulletins showing just where and when to reach him quickest by mail or wire. Advertising matter, however, is shipped from the Chicago office. As soon as you are sure you'll want them, a post-card request will bring you the twenty-five window cards with which to advertise the lecture. Following is a list of the towns in which efforts are being made to put on the lecture and have propaganda meetings. In twenty-eight of these final arrangements have been made:

*Illinois*: Springfield, Normal.

*Indiana*: Terre Haute.

*Michigan*: Ann Arbor, Ypsilanti, Detroit.

*Ohio*: Cincinnati, Cardington, New Lexington, Cleveland, Springfield, Belaire.

*West Virginia*: Wheeling, Moundsville, Glen Easton.

*Pennsylvania*: Erie, Philadelphia,

George School, Chester, Harrisburg.

*New York*: Buffalo, Fredonia, Utica, Moira, Brooklyn, New York City, Ithaca, Alfred.

*New Hampshire*: Manchester.

*Maine*: Portland, Waterville.

*Massachusetts*: Boston, Newton Centre, Brockton, Worcester.

*Rhode Island*: Providence.

*New Jersey*: Asbury Park, Newark, Princeton, Elizabeth.

*Virginia*: Norfolk, Emory.

*North Carolina*: Raleigh, Durham.

*South Carolina*: Charleston, Sumter, Columbia.

*Georgia*: Savannah.

But don't be alarmed—there'll be a date left for *your* town, if you get busy *now*. Not all who are trying to perfect arrangements will be able to do so, though twenty-eight engagements are positively closed already. We're going to "shake 'em up" all along the line. Can't we make your town a storm center? Let's try, and try hard!

---

### WOULD YOU PICK UP \$1.19?

---

If you saw \$1.19 lying on the sidewalk would you pick it up?

The answer is: "Yes—any day but April 1."

Here is where you pick up \$1.19:

You have been sending us small orders for Esperanto books—average size \$1.25 each. You have to buy a money order, or think you do, which is about the same, for none of us like to send loose money in letters.

To send five dollars in four little money orders costs you:

Five dollars.

And twelve cents for fees.

And two cents' wear on your shoes.

And five cents' wear and tear on your patience.

And fifty cents' worth of time.

Now, for that plain five dollars (and, really, we don't mind taking your check for \$5.00 and over) we will send you a Coupon Ticket, which you can cut up and use as exchange in making remittances—just as easy! If you want to order 45 cents' worth, you simply clip off (at *one* clip) coupons to that amount, enclose them with your order, and there you are!

And you have saved your twelve cents, and your time, your patience, your shoes—total .69 cents.

Wait a minute! Each COUPON TICKET is good for \$5.50, and that's where you make another half-dollar. The total is now \$1.19, which, if you use up the ticket in six months, would represent nearly fifty per cent a year interest on the cost of your ticket.

Don't worry about our losing that fifty cents. As soon as you find how easy it is to order books by using these COUPON TICKETS you'll simply buy more books, and you'll renew your subscription more promptly. We will accept the coupons for renewals—but we draw the line at subscriptions in clubs; for *these* the coupons will not be accepted.

Order a Coupon Ticket today. If you're buying a dollar book, add four dollars, we'll cut off \$1.00 to pay for your book and send you \$4.50 in coupons. Renew your subscription, add \$4.00, get \$4.50 back.

Isn't it simple?

If you don't understand it, ask for a "Sample Coupon Ticket." After that, you'll have a real one of your own.

This magazine goes to press at noon, Friday, March 25. There are now thirty-two lecture engagements closed for Baker's eastern tour, out of a possible forty-four. The committees which delay their decisions too long may be asked to take June dates. We don't want to hurry you; but it'll be of great help to us to know right soon just what twelve towns are to take the twelve remaining "dates."



# Thirty-two Towns Answer "Yes!"

Are you willing to do some personal WORK for Esperanto in your home town?

Will you assume, for the purpose of a meeting, to get together people who are interested, and to awaken new interest, a financial risk of Ten Dollars? This does not mean that you are necessarily to pay this sum. It means that you guarantee that, in case ticket sale, if tickets are sold, or collection, if a hall collection is taken, fails to raise \$10.00 for the general expense of the lecture tour, you will THEN see that the amount is paid. Our hall collections in western states averaged over \$6.00; ticket sales averaged about \$20.00.

In answer to many inquiries, let us repeat that this is ALL the expense of these lectures from our side. We furnish advertising matter as stated, prepaid; we prepay our telegrams, and even if the actual expense of adding your town to the route is \$25.00, you pay only \$10.00, the amount assessed as a fair pro rata for each town. "May we deduct hotel expense if we entertain the lecturer in our homes?" is a question sometimes asked. The answer is "yes," but this should be understood in advance, as the lecturer may feel some hesitation in suggesting it. Some people take it as a matter of course, while others would be offended at the suggestion.

ARE YOU READY TO TRY?

Then send us a post-card right now!

As soon as you have located your auspices and hall, find exactly what nights are TAKEN for April and May. Write us a list of the CLOSED dates, and we'll select ours from the rest and notify you and ship advertising matter at least ten days in advance.

As soon as we learn on what train the lecturer is scheduled to arrive in your town, we'll notify you. If there is time, you can arrange for short talks in your colleges, high schools, universities, business schools, and women's literary clubs. Mr. Baker will not make long night rides in order to do this where there is a daylight train arriving in ample time for the evening lecture.

A little courage, a little hustling, and we can have an Esperanto club in YOUR town.

Can't? Oh, bosh! Write us and say you WILL!

---

**AMERIKA ESPERANTISTO**

700 East Fortieth Street,

CHICAGO

# CLASSIFIED ADVERTISING

Rate per line.....10 cents  
Minimum charge.....20 cents

Prezo po linio.....\$d. 20  
Minimuma sumo.....\$d. 40

## FAKO DE KORESPONDADO

**KLARIGO KAJ REGULOJ:** La signo **P** montras, ke oni volas nur poŝtkartojn vidaĵajn; la signo **L**, nur leterojn. Sen signo, aŭ leterojn. Tiom da amerikanoj volas fremdajn korespondantojn, ke ni enpresas senpage adresojn de eksterlanduloj. Kiam vi skribas dudek personojn, ne esperu pli ol dek kvin respondojn, ĉar eĉ esperantistoj estas nur homoj.

### UNITED STATES

**P** C. H. Gibbons, 407 Winona St., Austin, Minn.  
**F**no. Beulah Amidon, 379 South 7th Ave., Fargo, N. D.  
**S**ro. Arthur Bennett, 701 Holdridge St., Elmira, N. Y.  
**P** Sro. Robert Moore, Clayton, Washington  
**P** Sro. John A. Shell, 113 Bradford St., Albany, N. Y.  
**S**ro. F. M. Ledbetter, Fort Mitchell, Alabama  
**F**no. Caroline Schoenbut, Manson, Iowa  
**P** Sro. James Graham, 522 Jefferson Ave., Niagara Falls, N. Y.  
**P** Sro. Victor H. Jindra, Wilber, Nebraska  
**P** Sro. Louis March, 1326 West 18th Place, Chicago  
**P** T. W. McKee, 1104 Euclid St., Champaign, Ill.  
**Miss** Emma J. Newell, 124 E. Main St., Westfield, N. Y.  
**O. R. Hamilton, E. F. D. 1, Franklin, Texas.**  
**Prof. A. J. Charles, Westfield, N. Y.**

### FOREIGN—EKSTERLANDA

#### AUSTRIA

**S**ro. Vasil Krejsor, Hronov, n-M, Bohemia  
**S**ro. L. Svirnek, Silesio p. p. Dobra, Nošovice  
**S**ro. Novaček Vachav, Stud. t. c., Místek, Moravia  
**S**ro. T. Kugler, Podebradova ul. 620, Prag-Lizkov volas interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtkartojn  
**S**ro. Ant. Jos. Ohme, Niedergund, B. N. B., Bohemia

#### BELGIUM

**S**ro. C. Rogister, 102 Lambertmont, Place de Liege, Belgium, volas korespondi kun Socialistoj  
**S**ro. T. Verbrachen, 46 Longue rue Oeteroom, Antwerp  
**S**ro. Peter Madon, en Banst Prov., Antwerp  
**S**ro. Theo. Durieux, Dodoestrato 34, Antwerp  
**S**ro. Leonard Buerbaum, 60 Avenue Moretus, Antwerp

#### BULGARIA

**S**imeon K. Bardaroĉ, strato Varaj, Plevna

#### CANADA

**S**ro. L. H. Gorman, Box 624, Prince Rupert, B. C.

#### FRANCE

**P** Sino. Tromont, Villenauxe, (Aube)  
**P** Sro. Peter Parret, 29 rue de College, St. Flour, (Cantel)  
**P** Fino. Margar Lec, 1 pl. de la Courtine, Remiremont, Vosges  
**S**ro. E. Gristier, 50 rue Louis Thuillier, Amiens (Somme) precipe pri negoco kaj frabrikado de koton teksaĵoj  
**S**ro. L. Gaquer, 38 Boulevard Garibaldi, Amiens (Somme)  
**S**ro. G. Poirier, 114 Rue de l'Union, Amiens (Somme)

#### GERMANY

**S**ro. G. Dehning, Kernerplatz 6, Leipzig, Germany, volas korespondi kun geesperantistoj en Chicago, Washington, D. C., New York kaj Providence.  
**S**ro. Georg Hillebrecht, Gogessangstrasse 81, Elberfeld, Germany, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kaj korespondadi esperante, angle aŭ germane kun ĉiulandaj filantropoj pri social reformo. Gesamideanoj, kiuj intencas viziti rejnlandon ricevos pretvole informon.  
**Erick Rittner, Breslauerstr. 57, Schweidnitz, Germany.**

#### HOLLAND

**P** L. Wynschenk, Jan Blankenstraat 70, The Hague.  
**P** C. Koekebecker, Papanstraat 13, Delft.

#### MEXICO

**S**ro. M. C. Rodriguez, Apartado postal 139 bis, Mexico, D. F.  
**P** Sro. Francisco de P. Llamas, Villarreal, 208, Zacatecas  
**S**ro. Wenceslas Rodriguez, L. y Oca. 10, Vera Cruz, Mexico

### HUNGARY

**S**ro. Nagy Jozef, studento de medicino, Budapest VI, Hegedius Laudor u. 17, III, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kaj poŝtmarkojn.

### ROMANIA.

**S**ro. Bernardo Herškoviĉ, strato Kazarmeĵ No. 6, Bucharest  
**P** Isidor Steinfeld, Sto. Faurari 27, Bukaresto.

### RUSSIA

**J. Svareberg, Rilsk, Kurskoj gub., Russia.**  
**P** St. Gluchowski, Waganiec, Poland  
**P** B. Gluchowski, Klonowiec, p. Kutno, Poland  
**S**ro. Aleksandro Vlasor, Icejakoja 22, Kv. 5, Petersburg  
**P** Sino. O. U. Semenova, Kluĉevaja 7, Vladivostok  
**P** Fino. Edith Ellender, Lidsen (de Barono London) per Volmar, Livlando  
**S**ino. A. Astafjev, Velsk, gub. Vologda  
**S**ino. Persikov, Velsk, gub. Vologda  
**F**ino. T. Persikov, Velsk, gub. Vologda  
**S**ro. Ponomarenko, Velsk, gub. Vologda  
**S**ro. N. Soloviev, Velsk, gub. Vologda  
**S**ro. Diodor V. Ziatorunskij, Duhovnaja Seminario, Kavkaz, Stavropol, Russia, volas korespondi per ilustritaj poŝtkartoj de urboj .

### SCOTLAND.

**S**ro. Thomas Grieve, 16 Snowden Place, Stirling

### SERVIA

**P** Isailo Venadoviĉ, 9 Zeleni venac, Belgrade, Servia, interŝanĝas kartojn nacikostumajn.  
**S**iniša Budjevac, Brankova 10, Belgrade.

### SPAIN

**S**ro. Francisco Zarzoa, Elcano 3, Bilbao  
**S**ro. Dominika Mayor, Strato Salud 22, Sabadell, Barcelona  
**P** Sro. Toaquin Palazon, Momercio 29, Barcelona  
**S**ro. St. Bacardit, "Ejero Kataluna," Paradis 12, Barcelona  
**S**ro. Van Der Hoek, Boterbrug 5, Delft, Holland, volas interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn  
**S**ro. Gerardo Muinos, Casilla de Correo, 737 Buenos Apres, R. A.  
**S**ro. Philip England, 127 Victoria St., Auckland, New Zealand.  
**S**ro. Jov. S. Markoviĉ, Vaporŝipa Kapitano, S. B. D., Belgrade, Servia.

### REKLAMADO.

**S**ro. J. Fred Knowlan, 1701 North 52nd St., Philadelphia, Pa., volas aŭdi de usonanoj kiuj havas fremdajn gazetojn por interŝanĝi.

**LA ESTONTA VIVO.** Ĝi estas aŭtorita kaj interesa libreto. Ne estas necinta historio, sed la vero de la plumo de unu kiu estis permesita viziti la superteran mondon. Ĝi faras al mi plezuron sendi la libreton al iu kiu dezirus ĝin.—Fred R. French, Campello, Mass.

### ESPERANTAJ PRESAĴOJ

Mi faras ĉiuspecajn presaĵojn aŭ Esperantajn aŭ Anglajn, rapide, zorge kaj bonstile, je nealta prezo; donas antaŭkalkulon, kaj avizon senkoste. Sendu 2-cendan poŝtmarkon por pamfeto "Cu Esperanto Vivos" kaj aliaj ekzempleroj de Esperanta presado.—Ernest F. Dow, Esperanta Presisto kaj Eldonisto, West Newton Station, Boston, Mass.

**NEW ARRANGEMENT** of the oficial Esperanto Song, La Espero. Can be sung as a solo or quartet. Beautiful title page with map of the world, and star in green and white the Esperanto colors. Arranged, published, and for sale by Prof. W. D. Andrew, 1328 East 47th St., Los Angeles, Cal. 18c a copy, postpaid; 12 copies \$1.75.

Cu vi havas procesojn kontraŭ fervojoj kompanioj, aŭ pri terposedaĵoj. Mi povas fari al vi profitojn. Skribu al mi kaj ne permesu ke la leĝoj pri templimoj malhelpu vin.—D. B. Axtell, Advokato, Franklin, Texas, U. S. A.  
**Hair Goods, Toilet Requisites. Specialty, Wavy Switches.**  
—Prof. A. J. Charles, Westfield, N. Y.

# Plena Vortaro Esperanto - Esperanta

kaj Esperanto-Franca

This immense work, compiled by Emile Boirac, president of the Lingva Komitato, will be issued in two volumes. The first volume (A to Kz), containing 180 large pages, with a twenty-page digest of the methods used in preparation, is now ready. As indicated by the title, the definitions are in Esperanto and French. The Esperanto source of each word is shown, as also the European languages in which the root is found, thus enabling the student to exercise intelligent discretion in the choice of words.

Printed by the Darantiere Press of Dijon, France, and imported by us.

Volume I (A to Kz), postpaid, \$1.20.

Patrons are requested not to order Volume II until announced.

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

700 East Fortieth Street,

CHICAGO

## SAY "INTRODUCTION".

This thing of *studying* a language is new to the average man, who learned his by hearing his parents speak it.

The average man's ideas on grammar and language construction are very, very hazy.

If you want something to cast light into the dark places of his mental garret, ask for AN INTRODUCTION TO ESPERANTO. This is a 32-page book, simply and carefully analytical, in language which the average child of twelve can understand.

It was made to retail at ten cents, but so many people have wanted to use it for propaganda that the price has been reduced to five cents a copy.

For the man who is wobbly in his grammar the INTRODUCTION is exactly what you need. Have a few copies included with your next order, and TRY IT.

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

700 East Fortieth Street,

CHICAGO



The American  
Esperanto Book  
ARTHUR BAKER

"The very best manual yet produced."—*The British Esperantist*